

Ivo Sennom-Senmon

# ROMANAÇO



**grava atentigo!! Ne tuŝu ĉi dokumenton! Kronvirusa12 danĝero!!!**

Romanmaĉa Memeldono

**eldono: 07.03.2020**

Leganto rajtas reuzi, modifi, traduki nepre menciinte la aŭtoron de ĉi tiu deira unua teksto kaj sendinte la faritaĵon al la ekaŭtoro ivorezeano. Ĝi donos al mi rajton uzi la modifojn siajn en posta versio de tiu teksto menciinte lin kiel kunaŭtoro se mi konservas ion.

**ivorezeano@gmail.com**  
**esperantoreze@francemel.fr**

# **Ivo Sennom-Senmon**

**kunaŭtoris**

(

**Gaston Lapipron,**

**Klod Var-Higien,**

...

)

**ROMANAĈO**

**romanmaĉa supo**

Romanmaĉa Memeldono

## ENHAVO

1) Romanmaĉo.....	1
2) Esploroj: Pri la arto vortaĉi al la via ĉeulo.....	5
3) Tediĝo.....	6
4) Iu trovo.....	9
5) Ĉe Bernar PIVo-VarHigiena.....	12
6) Survoje al solvo.....	15
7) Fino?.....	17
8) Antaŭen!.....	19
9) Serĉo.....	20
10) Buso.....	21
11) La PasVorto.....	23

## Romanmaĉo

«Ĉu? Vere?» "La etaj verduloj" -tiuj ĉi alisunaj neteranoj- kunis ĉe glaso, ĉirkaŭ duonpura tablo, ie, iam ... Ĉiuj diversdevenaj, diversplanedaj, diverslingvaj.

Kiuj? El tiuj nekonatoj, forĵetatoj, senrajtuloj. Tiujn oni ĉie forrifuzas, taksas ilin krimemaj, kontraŭordaj predikantoj, danĝeraj uloj... Jam de pluraj generacioj paliĝis verdeco iama... Tamen.

Iu, ŜliSes estas ties nomo aŭ tiel ni nomos ĝin(aŭ lin, aŭ ŝin, aŭ ŝilin, se tiel bongustas por vi), ĝis nun ne parolema, kun nigraj haroj kaj barboŝajno dektage grizeta: «Mi Verkos. Eldonos. Iĝos konata». kutime, tiu anaro estas nur rondo de vortolasantoj ree dirodiraj (iam ridoridaj aŭ diroridaj) ĉe filo-psiko-zofo..(Pri la signifo de 'filo-kotopo-ulo' ne demandu min kaj... (Mi devojiĝas). Plej ofte eligi ion el la propra vivo por iu supozata bonfarto... sin-dir-parolo de., parol -grupo, la nura grupa interparolo por la komuna rido, aŭ supozata arta reuzo de ruboj, kune, aŭ ajna faro preteksta por enspezo al Ŝilatedo, la permesita profesiino. Tiu psiko..ko.to.po. Krome, tio evitas iun plian troan vivrakontaĉon ĉe eldonisto...

Jen, duondemande, skrapante el la nazo...Lilanulo... Aspekti kiel eble plej interesita pri.. Iu rea «ĉu» eliĝis, dubema, de sur alia seĝo ...Ne lia. Ĉu, li, la demandanto, post lasta gluto?.. Tiu alia tedas vin... Nu, minimumaj reguloj de ĝentileco devigas iomon da diroj... Silento ne bruu tro malafable...

ŜliSes diris, aldone, el la desupra certeco : «Jes ja. Mi intencas verki ajnon por la diro same kiel por la rido. Tiu ĉi.. mi ja fieras pri tiu ĉi...» kaj montris alten manon. Malplenan. Eble, tamen, por pravigo sia, ĉi tiu paperaĵo ne pli granda ol poŝkalendara paĝo, apenaŭ plena de farendaj neagoj, skribmaĉita mane kaj ja evidente nelegebla...

Rideksplodis la tuta anaro... Krom...

"Por la aldono: Mi verkis ion aĉan, mi celas aĉecon plejan".

Krom tiu, ne sendira, la senrida Linulo : «Vi tiel montras la tuton de via verkokapablo... ja vere ne trea.. Supozeble, ne tre suferis ĉe la tasko», dume suĉe englutglutante duonon da bierpleno pro rondigi pli la ventron. Tion ĉi li dividis kun Liunu... (glutglutemon kaj rondecon li dividis, ne la glasplenon!) «Aĉ kaj


kaĉ! Azenpiso!»... Kaj ja ensorbis la duan duonon da... Nur repaf' de glaso sur tablo, gutspruĉante sur kajeroj ...

Tiu : "piso?"

Li, grumbla: "urino".

Ĝi, la duseksa: "Jes, ja, vi konas.

Urino... insekta uro".. Ridpafado respondis. (Malmultaj mamutaj inter ili



renkontis la beston **Bos primigenius** en ĉi urbo)..

Tiu tria, aliseĝa, predike, vortariste: " 'urino': likvaĵo el...; ellaso de ĉi tiu...;(...) En PoVo vi trovos."

Tiu unua : "... Jes,

komprenas. Dunko."

Ĉi tiu, Ĝisciasli, grumble : "DAannkaŭN **ne dunko... taujge parolo vin!!!**"

Ridoj. Senkomprena Ĝisciasli mutis. Litri, responde, por la ĉirkaŭantoj: «Iu gustumis azen-urino?» ». Ĉirkaŭ tablo la ĉeestantoj sumadis poentojn gajnitajn ambaŭflanke, por la rido... Videble, tiuj du ne tre ŝatis inter si, unu alian. Kaj por pluo plia, Ŝibonvar : "Vortaro? Akademio? Pison de azeno mi ne trinkis, ne povas juĝi pri..." Supozeble, akademiidire, li celis: "Tio ĉi gustas kvazaŭ urino de besto nomata azeno"? Ĉiuj kaŝe verifis: jes! azeno estas tiu konata negranda kvazaŭĉevalo, tute simple. Pri la oficiala latina nomo ĉu iu scias? Iu ĵetis por

plaŭdoj : "**Equus asinus**



**asinus"** sed, ja, tio neniom informos nin pri la vera surlanga kaj ĉenaza eco de tiu likvaĵo.. Sindemandoj ĉiufankaj, scivolemo prema..

Finfine, interesaj ĉi tiuj kunvenoj, kaj en la afero ĉi tiu psikozofisto estis nur preteksto por kunado..

Sed, supozeble, ja pri tio ne temis la novelo-romanumo kiun ŜliSes intencis eligi publike.. Rakonti pri murdoj ene de babilama psikozofa parol-grupo? Eble?... Plej certe neniu konis la ŜliSesan enkapan deziron, kaj, se paroli el vervola koro, ŜliSes same. Tio estis nur, nun, unupaĝa tekstoprovaĵo kiu ne bezonis ajnan rajton, kaj aliajn iojn. Nur diremo, prema, sintruda, estra, kiam vi bezonas nepre eligi ion el la kapo... Eligi vortojn. Kvazaŭ premo de urinpleno troa. Jen por si, jen por la ĉirkaŭo. Eble nur Internet-reta tajpaĵo semajna, 'blog' se pli plaĉa por la viaj oreloj- por la kutimuloj... sen plua plia eldono... Sed, se ajna aldono, kaj ŜliSes ridis silente en la kapo.. Sufiĉu la pseŭde bonorda sinsekvo en la rakonto, iomo da pipro sur la tuto, kelktaga kuirado en kapo, rea skrapado, polurado... Kaj tio iĝos pleje laŭmoda! Sed, eble, pli simple, uzi klavaron aŭ ajnan skribilon, jen por papero, jen por ekrano....

Kaj, ŝajnigante plejan interesiĝon, tiu alia, la junulo, antaŭe apenaŭ vidita en tiu ĉi bonpsika parolrondo, karesante senharan mentonon... Li vortigis la demandon: «Kaj, ene, kio? kio ene de? Aĉa ja estas diro plurdira, plursignifa...multaj la signifoj. Kie la aĉeco? Ĉu Marsanoj dormemaj kaj energiuloj militemaj de fora planedo forgesita? Bestoj ridemaj kiuj mokas homaron freneze sindetruan, eĉ pli stultan ol la ĉiloka ularo? Detektivromano humure memmoka, Murdoj inter blusteluloj aliplanedaj? Sur ĉiuj kontinentoj samtempe? Sciencfikciaĵo, amara amromano sen aromo?».

Ŝlises: "Prava vi. Plurdira la diro... Aĉa ĝi estu en la skribo mem.. Teda, dormiga, sen enhavo kaj eĉ pli sensuka ol vespera televidaĵo.. Rakonto sencela kiam vi jam scias la tro evidentan finon...

Se paroli pri stilo. Pezaĵoj, sengustaj frazoj..

Kaj aldone lingve aĉa. Ne konata la vortaro kiam uzas vorton el la denaska... Imagu, kiam iu aldonas o-finon por laŭdira kompreno. Se diri ion plu, esperinde. Sed ja romanaĉo ĝi estu...aĉega. Imagu jen la verkinto aŭ verkonto, ĉar ĉu mi ekskribis ajnan unuan linion?, iam skribas 'punktojn' (evidente ja eraris duonkrokodile!!!, sed tio ja romanaĉo, do, prave faris tiel aĉante....) kaj alimomente -aliam se vi emas!- skribas konvene ja, "poenton" samcele... Krome kaj aldone mistajpoj, forgesitaj akuzaj no-finaĵo akuzative.. Mi ja plenumu la promeson!!"

Ili, oreloj, pene iris la vojon de la tro rapida diro de ĉi tiu... Iuj, por ĝentileco,



nenion kompreninte, ekridis sen plu. Kaj vortoj plu pluvis el la buŝo...

Iu, tiu kromnomita, la moknomito 'lisendir', elmetis rimarketon : "Certe ja bluaj steloj ja ne ekzistas, do, viaj murdoj inter blusteluloj... Viaj blusteluloj estas pleje stultaj..."

"Jes. Same kiel verdaj steloj.. Ne tre varmodonaj tiuj ĉi, ĉu?"

"Amiko, iome esploru antaŭ ol diri neverojn! Verdaj steloj pli varmaj ol la flavaj... Sed ja, pri fiziko kaj astrosciencoj vi konas ne eĉ eteton. Krokodila volapukisto".

"Amikoj! Ne por batalo pri scienco la kunveno!".

ŜliSes: «Pri enhavo... Se paroli sincere, ankaŭ mi ne scias la enhavon. Konas mi nur la titolon: 'Romanaĉo'. Tio ja sufiĉos kaj liberigos min de ajna literatura ambicio». «Jes ja, roman-maĉo...». Ree tiu Lilanul. Poento plia por la ridantoj.

Ŝilatedo, la tre desupra altulino, psikologozofo, paroligis ŜliSes-on... per nigra rigardo kulpiga : "Ĉu vi vere certas ke tio estos bonfartiga psikozofe?"

"Eble..." ŜliSes ne aldonis ke tiel eble ĝi povos forbalai tiun psikozofon kaj psikozofos ĉe drinko plaĉa kun la kor-anaro, en iu ajn trinkejo, tuj proksime, tuj poste.

Silentado pezaĉa. Senvorta la tuta ĉambro.. Kaj pafe, kiel eble plej abrupte, tiu ĉi ĵetis: "Ideo mia: Se tiom sendira la romanaĉo, verku ĝin la legantaro, ne la aŭtoro. Parolu kiel eble plej insulte per vortaĉoj la legintoj... Ni! Ni la legontoj estos la aŭtoroj aĉaj! El tio unu ĉapitro plia!. Antaŭen al la dua ĉapitro, vi la kunular' ".



## Esploroj: Pri la arto fi-vorti al la via ĉeulo.

Resume, se vi ne legis la ĵus-antaŭan ĉapitron : Iu proponas ke la legantoj mem verku la romanon ĉar la verkinto estas plena nekapablulo....

"Senpensa la via ideo" ĵetiĝis de ĉi tiu vinulaĉo. "Kaj ĝi, li tamen diros: 'mi aŭtoras'. Reprenu vian vomajon".

"Vi, la volapukisto, diras stultaĵojn".

"Silentu! Vi estas nur pugdonaco sencerba. Alidire, por ĉies kompreno: fekaĵo. Aŭ, por la belvortaj oreloj viaj: postaĵa malmanĝo, elkorpa rubo, elpuga delaso, anusdonaco, puglaso, postaĵ-kolbaso, neĉeseja ellakso..."

"Amikar' mia! Ne elpoŝtu plu tiom da vortaĉoj! Ne tie ĉi por elmontri vian dirkapablon imagoplenan".

"La sinjoro nubsuĉanto volas belvorti".

"Vi, la riisto, certe ne nub-suĉanto... Sed ja rub-suĉanto.."

"Laŭvole feku viajn diraĉojn. Mi tute komprenis sen via traduko sed via pula cerbo ne kapablas scii tion"

"bona la ideo... Tiel ni ĝuos insulti la ekaŭtoron, ekfarinton, la sindiran verkinton vortopisan, la."

"Vi, haltigu vian senfinan vortopafadon, vi lacigas nin..."

"Kaj vi la tri tiom stultas ke vi ne komprenis ke tiu ĉi aŭtoraĉo...neniom aginte: por la sako! en la kason! Sed ja, via kapo naĝas en urinlago" ..

"Kaj la via cerbo ne naĝas: ĝi enfalis en ĉi tiun likvaĉon... kaj dronas. Kaj ne en bovlopleno! Oceano odoraĉa kun aĉa gusto".

"Vi fekmuŝa muŝfeko, fermu la vomujon".

"Reprenu vian ŝlejeraĵon".

"Vi la verda ŝtelo ŝlosu la vortokranon".

"Kaj vi, vi mola kaĉokaco, lasu en si la la vian supon".

"kaj Vi lasenkap fermu vian lakson.. kranon ŝlosu de la neĉeseja laso".

"Jes.. amikoj... Sed tiu ĉi ĉapitro estas tute aĉa, ni devos ja ree verki ĝin... Tiuj ĉi insultoj ne tre imagoplenaj... Tute ne da elpensado..".

(....)

"Kaj nun... Necesos verki la postan ĉapitron... Ek' al, amikar', antaŭen".

## Tediĝo

London, la 1an de aprilo.

Kafo jam malvarmis en la stomako... apenaŭa sinlavo... tro plenaj tramvagonoj, ne sterna, ne teni la virusodonan stangon, ne... Laborujon... Ĝi, nur memoris la ĵus-hieraŭan vortobatalon de la bandanoj..

(...)

Laboreje: Tie, for, en ĉi tagborejo.

Mensdetrua trofaro por iuj, traboro en la vivrobotaj vivrabetoj en la ĉiama al-aga sinĵeto... Tromovo, trodiro, trofaro, tro...

Por ĉi aliaj, la tuttaga enuo, la seninteresa tasko, la ĉiama "re kaj re"o...Kaj, ĉi momentoj en ŝajnoj, en nefaroj, en l'enuo..

Ambaŭkaze: deprimoj. Trofara deprimoj, trofara deprimoj. Li: !Jes ja!! la burnoŭto kontraŭ la boroŭto bora!

En iuj, trofaro deprimeksploda ;

Por iuj aliaj, en tiu teda senfaro aŭ rerea sencela agado, same vivdetruaj kiam,

el brakhorloĝo,

el poŝhorlogo,

el rethorloĝo,

el horloĝo mura,

el surpieda horloĝo,

el laborvoka vekhorloĝo laborvoka,

el ajna horkalkulilo,

el ajna hormontrilo,

el subnuba larmopluga sunhorloĝo,

el la hordona sablujo,

el ajna tempilo,

el la cerboĉeloj lacaj

el... tiuj sendire diros «Nur? Ne pli... Tioma estado plu ĉi tie...Kioma tedo..

Plenplena, plengisa».

sekundo,

sekundo,

sekundo...

Kaj plu plua nadlo...

(...)

...Kioma tediĝo... Plenplena, ĝispuga, mortiga. sekundo, sekundo, sekundo... Vere, nenio okazis en tiu ĉi policejo.. Nur la enurba iomo ĉiutaga. La teda reado el kutimaj plendetoj, kelkfoje.

Laboreje, ĉe komputilo el pasinta jarmilo, tablokomputilo el la okdekaj .. ŜliSes eltiris la papermaĉon sian de sub la sia skribotablo... Nur rea eklego, antaŭ alveno de iu brua malafabla estro. Envenis la unua paĝo. Eble alia titolo. La antaŭe pensitaj cerbumaĵoj fuĝis for, eble ree enestos ĉi fuŝitan kapon , alidire fuŝĉifitan... Mateno tro longis. Ĝisoste ree pripensi la enhavon...Ree cerbumi la tuton.

(...)

Ĉu iri la laborujan restoracion, en l'ensocia trebruo, inter (ge)kolegoj kiuj, aĉ ka fi!, remaĉis labortaskojn ekster la por-mona tempo, dum ĉi tiu tagmeza halto. Hontinde!!! Por sin malglui tiu tagmeza pormanĝa halto, ne por laborkunveno plia! Tiu ĉi ne enspeza. Sed ja, multfoje bongustaj la manĝoj, ĉiam afabla la kasistino por kuna rido. Enpreni tion kaj tion, porti la pleton, elekti senhoman tablon... Kaj se aliras frue, tuj ĉe malfermo ne tedos vin iu ajn..Kaj eĉ, postmanĝe, vi povos iomete plu ĉeesti antaŭ ol redoni pleton. Kaj ili, ĉi kolegaro, ili povos poste laŭplaĉe fuŝi la momenton per laboraĉaj revenaj diskutoj.

Ĉu en la paŭzoĉambro de kaf-kunadoj, por manĝi el la plastaj skatoloj? (Sed ree, risiko trovi kolegojn..). Eble... ondoforno por revarmigo de odoraĉoj... Ili komentos la tagajn okazintaĵojn elmontritajn televide en rea refojo...? Pri politiko(sufiĉus...i), sporto(kial do ili enprenis tiun malkapablulon?), fiagoj de tiu konato( neniu antaŭe pensus ke), sangaj policaĵ okazintaĵoj(ree mortopunon por...!).

Eble ŜliSes iros tute aliloken, en tiun rapidmanĝan restoracion, alistrate, ĉe biero, aŭ aĉetos sandviĉon. Sed romano tiel siaviva... kvankam, por romanaĉo teda, promesita, tion ŜliSes rajtas staki paĝon post paĝo...Finfine, ŜliSes elektis restoracion. Laŭnome " 'Bierejo de la amikar' ", sed certe ne bierfara la ejo... Plenplena de irovenoj, ete bruema el fluoj kaj refluoj homaj tajde... ŜliSes ĝuis tiun ripozodonan sonan fonon, oceanuman. «Ĉu???» Sen ĝeno, ne atendente respondon, eksidis fronte al tiu silenta duonaĝa homino..( Virino? ŝihomo? Sin demandis la aŭtoraĉo)... Kelke post ... iu revena «jes ja. Tagon al vi. Sidu, bonvol'

kaj bonven al vi, nombro ses'. Ŝi insistis. «Dankon» Kaj, plue, silentis ili ambaŭ... Enkape, remaĉe, rebate, tro...«Saluton al vi.». Sed ŝi kaj ĝi plu silentis...

Kelnero juna, iom ne memfida, videble tiom sensporta kiom sensperta, finfine aperis, senporta. Sed ja, ĉu al ŜliSes tiom urĝis? laboro ja, ĝi atendu. Ŝi, Laduo, diris:«mia gasto». «Kaj por vi, Laseso?» Laduo: «la ĉitagan proponaĵon...» «Trinkaj'?» duonsekunda pripenso... ĉu vino, biero aŭ... "bieron". Kelnero: «Ĉu la ĉinan bieron preme el krano... aŭ tiujn ĉi.. botele»...perfingra montrilo... «Do, kial ne, bonvolu» kontenta kelnero notis en sia kapo: «Ĉina, por la ses». Aliloke, enireje, terase, tiuj eltiris sandviĉon el papersako, duonruĝan vinon sur la tablo... ŜliSes, kelkfoje, tion ĝuis... Ĝi rigardis tiujn ĉe la trinktabulo, jen sur mise staraj sidiloj, jen parolantaj, jen senvoĉajn tiujn sur gamboj malfirmaj, kiam la bieristo elkranis plian ŝaŭmon por tiu kutimulo. Ŝi: «bone, ĉi tie, mi ofte venas..Ŝatas». ŜliSes, responde:«Ofte mi manĝas ion en la sandviĉejo kaj poste envenas tien por ensuĉi ion ajn por refreŝigo...». Silento. «Jes, mi jam vidis vin...». «Jen por vi». «Dankon» Bone. Ŝi finfinis ĝis lasta guto el la glaso... Post rapida forsaluto jam ne plu videbla... «Kafon, ĉu?».. «Ne. Dankon.» Pagi ĉe kaso, elsaluti..

Reesto en la sintedo de laborejo... Kaj pri la sia romano ne alvenis eĉ plej eta ideo... Por ĝin plenigi: Diri pri iu tagmeza laborhalto. Tio estos ĉapitro. Jen sonoris la enkapa horloĝo, por sin tiri el duondormo, el la laborrestado.

Tio estos paĝo plia.

## Iu trovo

Mardon...

«Trovia en eta ranlago».. Jen? Ĉu? La ŜliSeso vidita en la bierejo por kuna restado ĉe tablo. Sed tion scias vi, vi legis la antaŭan ĉapitron kaj tiuj ĉi policistoj ne faris tion.. La ŜliSeso vortopisa... Ili ne legas... Ne eĉ detektiv-rakontojn mokante pri... Ne disponas sufiĉan tempon, tro premataj... Evidente ja, vi jam vidadis tion milfoje, la policaj fakuloj ,esploristoj en la blankaj survestoj, fotis, diradis de alte pri... sciencumis plenvoĉe por la nefakuloj «Jes, jam mortinta antaŭ... nefacila la kalkulo... laŭ la korpa varmo, pli ol kvin horoj... Ŝajne ne da vundoj...Ĉu jam mortinta antaŭ la enakviĝo?». Ni lasu ilin agi kaj fari... Ni mikrofone demandos poste.

Tiu. Certe iu ĉefa altulo: «demandi la ĉirkaŭon...» «Hmmm, hmm...» ni ne konas la nomon kaj la ejo foras tro de ie ajn...Pli ol dek kilometroj inter.. Korpon trovis du kultivistoj, plej hazarde. Tiu ja silentis pri la stulteco de la ĉefo...Eble pridemandi la bovinojn ĉe trinko? Ne kapabla kompreni ke la unua paŝo estas trovi mortokaŭzon, nomon de la pereinto, DoNoA<sup>1</sup>prenon ĝian kaj trovon de aliaj informaĵoj ĉirkaŭe, eble ekpruvaj.

Ĉu paroli pri la ĉirkaŭo? Mi ne kapablus kaj supozeble tio neniel interesus la leganton, kaj same mi ne aldonos detalojn pri la ularo, neniel rakontos pri la koloro de la ĉielo aŭ subbraka odoraĉo de tiu ĉi... Aĉa lagumeto ranokanta, kie flosas kadavroj. Por la leganto: la fina nodo por ensorbi sekvan romanon kaj forgesi ĉi tiun post unuhora dormo.

«Sed, tiu korpa pentro,tiu tatuoj sur la mamoj, ...eeee. Mi celis 'mano'n. Pardonu. Strange ĉu?."

«Jes ja... Tio ne enhaŭta pinglo pentro, nur surpentraĵo nun apenaŭ legebla... iu renkontiĝo de farantoj, por la plaĉo...«Ni petos helpon de lingvofakulo por la kompreno de la teksto... Eble la teksto mem aŭ la uzata lingvo estos helpaj al ni... Jes jes...»

Sed ja ŜliSes ne povis helpi, kuŝanta nun, nuda, sur la blanka poresplora tablo

---

<sup>1</sup> desoksiribonukleata acido (DNA) portas la genetikan informon de ĉiuj vivuloj kaj de iuj virusoj. (Vikipedio)

en ĉi tiu sako. Pri la sia murdinto ŜliSes ne povos diri ne vidinte ĝin, kaj ja, nun, bedaŭris ne reklami la nekonatan lingvon... Tio ja estas morto kaj ĝis nun ne povis ekrilati kun la samsortuloj, la forpasintoj(Tiel decas diri anstataŭ la malĝentilan 'mortintoj'), forestis la malŝlosa vorto... Same kiel la kodmaniero... Tiu, en la kapo por la lingvistikaj ('prilingvaj' aŭ 'lingvosiencaj' 'lingv-esploraj' encerbe korektas la kolego). Por malbedo li esploris la sinonimojn, kapamuze en vortar-stakado: 'postvivulo', 'malvivanto', 'nepluulo', 'eksvivanto', 'iam-vivinto', 'eksulo'.

Rebata silento ĉies. Modeste, ĝentile, policisto al ĉi ne antaŭe vidita ulino: «Kaj pri la enhavo de la teksto»...

Ŝilatria: «Vere aĉe verkita. Ne majstrita, tute frenezaj diroj. Li preskaŭ ĉiam ne kapablis uzi la taŭgan vorton.. Iu aĉa idoajo krokodiluma. Eble ne marsano, sed volas kredigi pri la sia aneco ene de... Tio ja tre odoras permaŝinan tradukon. Ekzemple, tie, vi parolas pri bestobredado kaj meze en la frazo, vi legas 'la mamzono trinkis en la laĝeto'. Nur maŝinado... ".

Policisto: «Jes, jes, interese; La teksto mem?»

«Pardonu... nur iu krimromano inda je rubujo... temas pri detektivoj de nekonataj tempoj kiuj ne vidas la ĉeokulan krimromanon en la manoj de la murdinto... Sed ja, tiu ĉi estas en la ĉina... La ĉinan mi ne legas... kaj la bilda montrofingro sagas la leganton mem kulpinto! Vin! Cetere tio estas nur unua ĉapitro de teda romano... Kaj tiel sin prezentas ĝi.. 'plu en estonta plia paĝo sena je...'».

Ŝi, plu... «Vi pridemandu la ĉilingvajn grupojn ĉiurbe... Konas...»

La kravatulo, altulece : «La unua vojo estas tatuoj...kaj,vi! Vi ne diru al ni la nian taskon plenumotan. Ne ŝovu la nazon... »

«Jes, mi scias: 'en la mian vazon...'» ŝi diris plu.. kaj aldone, en la kapo: 'Ne tatuata! Nur amatoreca pentro sur haŭto!'

Li, la kravatulo fingre montris pardon eksteren...

Fine de ĉi ĉapitro la leganto scias jam apenaŭ pri kiu, kio, temas la rakonto. Iu plia krimromano... Evidente, ne tuj enpaŝas li... Unue sinsekvo da... Prezenti homojn, lokojn, 'okazis'-iojn... Kiel eble plej ŝablonaj la homoj, lokoj, diroj,

rakontoj..

Sed ja pezas siaj palpebroj kaj por pli kaj plu, li atendu ĝis morgaŭ... Nun, la atentopovo forestas. Kaj por la sekvanta paŝo... Pri la lingvaĉa romano de ŜliSes ni ne scios pli kaj plu... Verŝajne en la ter-reta ĉapitro -se tre urĝas al vi- ekestos iuj vojoj al... ŜliSes ne jam sciis la sekvon de la tuta verkaĵo. ŜliSes nur iris ĝis momento kiam morta korpo trovita en iu lagumeto. En la sia kapo ne eĉ plej eta ideo pri la pluo. Iu kunveno de parolemaj verkemuloj kun nedefinita t.n 'psikozofisto' monema, kiam du tute ne amikas, pseŭdaj tatuitoj, strangaj songoj, manĝo kun nekonatulino en bierejo, policsekretariino kontraŭ altulo. Kaj povas eĉ diri ke la kadavro estas sia...

(...)

ŜliSes kontentis: Ne bezonis serĉi kaj glu-glut-gl..umi mondorete de ligo al ligo por enigi nin en ajnan etoson en iu aparta lando aŭ regiono. Ne esplori la psikan enon pere de primensaj kaj cerbosiencaj eldonajoj nekompreneblaj... Nur miksi iomon el la propra sperto en iu poto ekstertempa, nenie. El ree reaj televidaĵoj sin nutri por. Vi apenaŭ sciis ĉu virseksaj, inseksaj, dubseksaj, duseksaj, senseksaj, la herooj. Same la aĝojn ne konis... Tio igis ŜliSeson libera. Ĝi antaŭĝuis la eldonon. Eble iu ideeto: Ĉu kodita la enmana romanaĉo?



## Ĉe Bernar PIVO-VarHigiena |

Bernar PIVO<sup>1</sup>: "Unue, ŜliSes, estas plezuro renkonti vin... Aŭtoro nekonata kiu sentime, aŭdace konfesas: Tio estas romanaĉo. Libro unua en malbona lingvo. Bonvolu prezenti vin..."

ŜliSes: "Nu, jes ja, kia ajn vortopisanto ne forgesas ke PIVO-higiene sigelumita verko estas asekuro... Mi ne dubas pri estontaj enspezoj! Esperinde..."

PIVO, duongrumble, kun akuzema vizaĝo, sagopafe: "Dankon, dankon... Mi esperas esti iom pli ol spezosekuro.. Ni enpaŝu la aferon, t.e, vian verkon: 'Romanaĉo'. subtitole vi aldone asertas, por la nekomprenejoj: 'romanmaĉo' kaj tiel ĝi odoras... Ĉu filozofiaj, porspezaj, psikaj motivoj instigis vin al tia provoko?" (Kial do mi invitis tiun ŜliSeson?)

ŜliSes: "Bernardo. Ĉu vi ĝisiris la lastan paĝon...? Mi ŝatus koni la nomon de mia murdonto...la transtempa iranto".

Bernar PIVO: «Sinjoro PIVO, bonvolu. Ni ne kune kunis...!!! Se paroli sincere... Mi legetis kelkajn paĝojn ĉe glaso... Kaj ekdormis... Vere teda. Fuŝe elpensita, fuŝe verkita, tajperaroj, aĉa gramatiko, rakonto ne komprenebla... Inda ĝi je tia titolo. Ŝablonaj herooj, eluzitaj kontraŭknaĵoj kaj aliaj vortludoj. Jen mi legas: 'la bora laboro', 'vivrobotaj viv-rab-otoj' Mi ne vere komprenis la vian fadenon celitan... Ŝajne urtikoplana pado kiam paĝoj sin vokas el paĝoj kiuj sendas reen al paĝo. Tiu aŭtoro kiu rakontas pri aŭtoro murdita kiuj verkis pri aŭtoro murdita...Kion vi celis, ĉu vi mem taksas la celon atingita. Ĉu tiu verkanto nomita ŜliSes, ĉu Vi? Ĉu plenumita la deziro?»

ŜliSes: ...«Eble... Bedaŭrinde, se ne finlegis la tuton, vi ne konos la murdontan kulpinton! Kaj...ankaŭ mi..bedaŭrinde»

ŜliSes enkape remaĉis... La murdoto estas mi. Mi supozas ke vi iome komprenis tion- kaj esperinde mi sukcesos trovi ĝin, antaŭ la murdo mem, la aĉulon kiu aŭdacis sendi min en malvivon. Se ne sukcesas mi ŝatus lin pugni ĝis sango kiam mi en paradizo kaj li en malpa...

PIVO, haltige: «Dankon al vi.. Nun ni pritraktu la ĵusan kvindektrian

---

<sup>1</sup>Bernard PIVOT prezentis prilibrans televidaĵon en la okdekaj

romanon de sinjoro Jenreo..»

(...)

ŜliSes: Estis necesa plaĉo sinjor' PIV' tiu invito.. Nun kune por glaspleno, ĉu? Antaŭen al la drinkad'...

PIVO: For!

Mardon...

«Sed, Ej! ŜliSes! Mi televidis ĝin, ĉe PIVo...»

«Vi kulturemas, vi la ŝilatria! Eh...»

«Ne moku vi. Jes, aperis televide, antaŭ kelkaj semajnoj. Eble iu tradukis. Aŭtoro vendosukcesa....?»

La kravatulo jen ellasis kvazaŭ ĵete la glason el la manoj. Ruĝa. Grunto «Do! Kion vi atendas! Vizitu la eldoniston kaj demandu»..

«Ĉefo! Temas pri memeldonaĵo! Ja memeldonado iĝis laŭmoda. Mi mem... 'PoEmaj poemoj' la sekvanta estos 'PoAmaj poemoj'. Da eldonisto ne estas... Kaj eldoninto ja ne povas paroli plu... Sed ja ni la nomon konas! Eĉ se nura kaŝnomo.»

La porkventra ĉefo povis nur klini kapon pieden cele al ajna rebato.. Nur repreni glason, suĉi iomon da nekonata malpermesita miksaĵo kaj ĵeti.. «Kaj ne nomu min ĉefo... Mi estas Sinjoro Direktor'»

... «Sed...», tiu etulino ellasis plu... «Tio signifus ke eble estas rilato inter tiu apero ĉe PIVO kaj la surpentritoj same pri pentristoj. Iu mikspotajo labirinta. Trovi kruc-punkton inter ambaŭ... Kaj same pri iu nenomita ŜliSes kiu je la kruc... Kaj pri memeldono estas profesiuloj aŭ kvazaŭ kiuj...»

«Vi! Mi jam diris: For! Vi zorgu pri la porĉefa kafo kaj lokbalao. Ne diru... Vi! Tri kafojn, tuj! Forbalau vin mem kaj ne ŝovu...»

... «la nazon en la sinjordirektoran vazon. Mi ne diru pri afero ekster la mia laborkampo...» Ene ŝi jam pensis: «Sendube, 'sinjorDirektor' posttagmeza kafo via gustos azenpise - aŭ eble, eĉ, homurine, se vi ŝatas pli-, mi zorgos pri tio...» ...

Post aldona «bonvolu, sinjoro alta direktista direktor' ne tabakumi ene, inter la muroj... la leĝon vian vi respektu...Tio via tasko, ĉu? Laŭleĝa iro...» ŝi elvaporigis.. Evidente ja, ŜliSes pensis, se kopii milfoje viditan televidaĵon nepre estu stulta estro, grumbla ulo porkventra, kaj iu sagaca kvazaŭa nekonato. Ni respektu la rakontofadenon ŝi pensis... aĉu ja la vortopakaĵo nomita romanaĉo ...Kaj same aĉu iu ESTRO. Kaj, same evidente, ŝi cerbumu por, finfine, ricevi la dankon de ĉi tiu alta estro al la helpinto.: ŝi, la sagaca etulino... kiu ĉe li, elmetis la taŭgajn supozojn..."

«Vi! Eksteren, tuj!!».

(...)

«Aĉa Kafo! pislavaĵo!» kaj sinjor' direktor' kvazaŭ elvomis la tuton...

"Vi diris? Mi ne komprenis..."

«Mi diris nenion!» elkoleris la granda estro... «Nur misvoja ensorbo... Mi preskaŭ ensorbis tiun lavaĵon en la pulmoj... Tiun ĉi....urinpotan plenen.».. Supozeble, li postvivos la noktovan trinkon.

(...)

Jam duone endorma la suno. ŝilatria: «ĝis morgaŭ sinjor'». Iu aŭtomata responda «ĝis» eĥis..

## Survoje al solvo

Merkredon, matene... Kiam nigra ĉielo emus ellasi pluvon. Policeje... «..'luton sinjor'»... «Dankon».

Tago simila al tiom da, demandoj aŭtomataj, petoj de plendantoj... Venis iu. Kelnero en restoracio proksima al... Li diris ke li vidis la murdilon en la sia laborejo, tiu bierejo.. «Mi vidis ĝin antaŭ du semajnoj, kune kun iu virino duonaĝa. Ĉu ili efektive estas amikoj? Ne tre parolemaj»... La policisto en la akceptejo enskribis tion rapide por rompi la enuon antaŭ ol reveni al sudoko meznivela. Respondis ke li informos la ĉefon. Ke eble, lin, kelneron, oni vokos por...

### Dimanĉon

Plia kadavro... Ni resumu se vi ne televidis la epizodon: Abrupte, telefona sonoro sintruda, nepra... Kaj survoja serpentumado, zumado plej laŭta, jenjena ruĝa lumo por la vojĉampionoj ke ili komprenu la mesaĝon: Ni polic' vi... la obeanto. Vi nur ŝaltu televidilon por la bildoj. Vi kopiu la tuton por glui en memoron.

Surloke, policisto: "Manojn ĉielen, se ne, VI ĉielon konos"... Evidente ja, nur poŝtisto dum la leterdona rondo, ni ne iros plu ĉi tiun vojon. Kaj supozeble la verkisto malmetos tiun ĉi epizoderon, eĉ se aĉa la romano... Iuj limoj ne transirendaj, ĉu?...

Ŝi en marĉo... Ree... Ĉu serimurdisto? Sed du mortoj ne sufiĉas por paroli pri sinsekvo. Verŝajne ĉi tie ĉar iu komprenis ke mi preskaŭ trovis solvon... Sed mi ne povas informi, nun mortinta.

Li: «Sed... Mi konas ŝin! Eĉ se hakumita tiel... Strange... Videblas io... Tatuajo... Tiun mi konas ... Nia sekretariino... Ŝilatria.. Jam de pli ol tri tagoj forestas kaj ne informis pri ajna foresto-kialo... Kial for? Kial ĉi tie? Kial ŝi? Kial do?»

Sinjor direktor': «Kiel do vi scias ke ŝi havis surmamam tatuon? Kaj, cetere, ne tatuoj, nur pentrado per tre fortika singlua inko»

Li, tomateca: «Heee... Somere, tre varmas.... Tra l' ĉemi'...»

Sinjoro direktor': «Ja, ja, ne aldonu.... Nur DoNoAo pruvos... Cetere la vojo de tiuj tatuitoj estas interesa, certe... Iu rebato. Vi, eble, demandu ilin... Sed mi multe pli kredas je serimurdanto kvazaŭ hazarde elektanta la viktimon... Eble iu apartaĵo fizika, ne pli. Jes ja, ambaŭ tatuitaj, sed nun, ĉiu estas tatuita, eĉ la mia paroĥestro»

Ŝi, en la marĉo: «Ne! kretenoj! Sed ja, MI, mi vidis mian murdinton. La tutan fadenon malbobenis... Atendu li...» Sed ja nun, dispecigita ŝi ne povis elkraĉi veron al la iama kolegaro. Eble ili finfine trovos la taŭgan vojon. La gvidan fadenon...

Dua viktimo. Serimurdanto? Supozeble, tiu dua murdito estis preskaŭ preta konfesi la veran veron. Ni nepre trovu la kulpinton antaŭ plia murdo... Sed ja, por krimromano ni nepre varmigu la rakonton... ĝis fina eksplodo de evidenta trovo.

## Fino?

...ŝvitanta ŜliSesladua eliĝis de plia timodona sonĝo. Vere nekomprenebla sonĝo kiam fame aperas televide, estas murdita, verkas romanon kaj titolas ĝin : 'Romanaĉo', kaj eĉ informas pri la aĉeco de la tuto... ŝin oni trovas en ranoplana trinklago ene de iu nenio..pugo de diablo.

Kio gravas nun? Taŭge sin nutri matene. Zorge, en senurĝaj paŭzoj, engluti kafon. Li ja riskus misvojan sorbon kaj kraĉojn, tusojn, apenaŭan spiron por finfine lumlum' de urĝaŭto, ne forgesante la nepran tamtaman sonoron por tranĉi al si iun vojon... Do ĝui la trankvilon de eksunanta mateno oriente kiam malica vento morda, denorda -evidente ja se norda sen-orda- bruas ekstere.. ŜliSesladua ĝuis, duonfermitajn okulojn, tiujn rostitajn tranĉaĵojn kovritajn de ĉiaspecaj konfitaĵoj kaj ioj nekonataj... Suĉis la kafon tro varman, kaj, duondorme, en kvazaŭa glito al cerbo ridis pri tiuj strangaĵoj... Eble el tiu ĉi kaĉo povus eltiri iun ajn rakonton... «Ej, vi, urĝu iom... Ne tro estas da horoj en la via tempokaso, laboreje. Kaj ĉi nokton vi ege ĝenis min... Ne povis dormi»... Iu kolero ne tro katenita, eksploda. Kelkfoje, edzkunado ne tute... «pardonu, aĉa premsonĝo...»". ŜliSesladua, verkisto... Enkape ridis.

Horoj, plu... trea cerba sinlavo en kalkuloj, planoj, antaŭplanoj, postplanoj, kaj finfine eksaj planoj... Jen ja la porspeza tago, jen ja la necesa horsumado. Kunvenoj ĉe la alta direktoro.

Uf... Tagmeza halto... ĝui la momenton, fuĝi for, silente, aliloken, for de kolegoj. Iri al alia manĝejo. Sandviĉo taŭgos. Eble, tiun bierejon? Neniam vizitis. Gustumi ion alian. Ĉu la ĉitagan proponaĵon? Kial ne? Nur transe de la strato, kelke post la vojkruĉiĝo..

Piedula transpasejo... Ja ne transiras ie ajn. Respektas.

Silentis iu "paf' paf", kvazaŭ ŝtopilo el ŝaŭmbotelo dum forfulmis jam la aŭto de la fiuloj... Falo grunden.

Du minutojn poste... Ej! ĉifoje ja rapida la polico! Ne eĉ poŝtelefona voko kaj jam! ulo en urĝaŭto, survoje en rondo matena, certe. Kaj ĉi tiu homamaso ĉirkaŭ iu homo...Ej... .Halti... ""For.. Lasu pasi. Polic'." Kaj li montris la ĉiopovan pruvilon paperan. Ŝajne, iu plia krimo. Jen, ree. Murdito, ŝajne. Serimurdanto

supozeble... aĉulo ja! Krome, publike, surstrate! Vere, ĉi urbo... tre danĝera... Mi petos postenon aliloken ĉe trankvila kamparo, ĉirkaŭata de arboj... sur vojo al emeritiĝo.

....

Vere tiu ĉi, jam tro sciis. Iam ni kune en ĉi foraj tempoj... Kaj tiu ŜliSes ja meritis la punon... MI estas la granda... Ne ŜliSes.

Kia kaĉ! Mi eraris... Tiu ene grumblas. Ba... ne gravas... Sed! Jes ja gravas! Ne la celitan personon mi trafis! Do mi devos ree murdi, hazarde... por pravigi la vojon de freneza serimurdanto... Kaj meze inter tiuj murditoj, senigi sin de la persono. Tiu ĉi serimurdanto ĉion aŭdacas.. Jam la tria krimo.

LI ĉe balkono... LI vidis la murdon. LI vidis el alia fenestro la interŝanĝon de aŭtoj... Lia nomo estas BOMB... dĵemc' BOMB...linulnulsep por la amikar'. Iu fulma interŝango. Li revenis al sia brando... Li, Launuo li atendu... linulnulsep ja dormos unue. Poste reen al la ĉarma mis-monopugo...



## Antaŭen!

Mi finfine malŝaltis la komputilon... laca. Restado troa ĉe ekrano. Finitaj la kalkuloj.

(...)

Dume, ŜliSes ĝuis la postmanĝan paŭzon matenan, kiam silento eĥas, bongusta, bonfara... Aŭ zumo reonda, fora... Bonfartiga ĉi-tiu monaĥeca momento, kiam mentono en la Vo de du manoj... Tiam ŜliSes elpensis ajnon, lasis iun cerbuman mensmaĉon invadi... Iu duona rakonto, noveleca romano... Bedaŭrinde la skribiloj forestas, klave, krajone. Kaj ne disponas ŝi la cerboleĝilon. Kiam disponeblaj, forestos la vortofluo, la ideoj, la noktaj pensaĵoj... Tiu paco insuleca en soleco.

Kraketis ĉe malfermo pordo portita de apenaŭ du fuŝe grasitaj turniloj ruste alitempaj.. Ili enpaŝis silente, kvazaŭ jam hejme... Nur ioma dormiga spruĉventado por ŜliSes... Afable malkovri tablon el bovlo kaj ĉiaj ioj... Ioma purigo sur ĝi. Balai... Eĉ pli bele ol... Povus esti proksimuloj, jen junaj jen ne plu, jen inaj jen malinaj, ŝiseksaj, lisesksaj, ĝiseksaj, jen bela...jen... Certe iu universala ŝlosilo por enveno kaj eliro.. Elpreni ŜliSeson kvazaŭ trodinkulon helpe ĝis hejmo...

Evidente ja, en la duondorma sonĝo ŜliSes elpensis ion pri vivŝtelistoj... Tiuj transvendas vian enon al iu alia, kaj repage unu aŭ du vivoj, laŭ la kapitalisma merkato. Ĉu plusvaloro, ĉu malplus. Eĉ imagis sin forŝtelita de afabluloj kiuj balaas kaj purigas la domon.. Vere sonĝoj kelkfoje plene frenezaj.

## Serço

Post la matenmanĝo...

Levo de aĵoj, ĉemizoj, kotopoaĵoj...

Eble, mi trovos ion... Vento vin skuas kaj pluvo draŝas... Ej! Kio tio en la poŝo? La mian vivon perditan, ĉu? Kie do tiu memorpleno? Fek! Nur iu poŝkajero plenplena je telefon-numeroj, kodoj ĉiaspecaj, datoj..."

## Buso

Finfine? Eltiri la poŝhorloĝon... Ĝuo. Sed ja pri la ĉiutaga senplaĉo mi jam diris. ŜlilaNaŭa malfaldis sin el iama brakseĝo. Ree iu dumlabora dormo, refoje, kiam vi sonĝas strangaĵojn. Ne tro malurĝi por albusi hejmen... Certe ja daŭras pli ol aŭta iro, sed pli bone... aŭte VI stiru, atentu, kaj devas la okulojn trude teni malfermitajn dekstren, maldekstren. Publikaŭte: Rajto sin delasi... Certe la busoj 23 aŭ la C6 por trovi halton en CirkoPlaco kaj piediri ĝis KomercPlaco por la tramo.. Kaj.. Jen, 23 alvenas. Kur' kaj kur' en la sama... Anheli el la pulmofundo post kuro, por ne atendi plu dum malvarmaj dudek minutoj... Montri la permesilon... Enen... ŜliSes sin delasis fale, laca, en neokupatan seĝon... Post kelkaj dekoj da minutoj, alvenos celitan halton.. Ĉu preni la libron el fatrasujo kiun oni ĝenerale nomas dorsosako? Ne. ŜliSes donis al si la rajton al iu bonfara senfaro...

(...)

"EEEE.. vi... Vek! Montru la pas'on..."

Ĉu poŝesplorado. Tie. Kie ? Kaj tiu "E..». Tiu : "Kion ni faru?" "Ĉu vi scias? Ni elĵetu lin tie.. Mi ne volas.." "Jes.. prave, ankaŭ mi ne..."

Ĉu kompreni? ŜliSes ne retrovis... Kompreni. Kio tiu golfo, kio tiu haltejo de la linio 23 nomita "Haveno la blanka"? Stranga la haltejo, la stacio. Ŝajnis tamen por ŜliSes ke tio ne la nomo de la stacio fina. Ĉu mondekstremo? Jes ja, linio 23. Iaspeca lagego... For, la alia flanko, kaj jen, insulo... Tie, mapo?... Tiom da velŝipoj. Sindemando. Tiu "Insulo de monaĥoj" kie vi ne trovos monaĥojn, monaĥojn.... Golfo kvazaŭ ŝlosita.

ŜliSes ekpensis: "Strange, jen mi, kvazaŭ en duoneŭra poŝromano, kiam la heroo enfalas alian mondon. Milfoje vidita sciencfikciaĵo... Sed ja mi ĉeestas nenie... Kaj tiuj du parolis pri io nekonata dum mi rolis dormanton. Sed ja tio estas linio 23, tiun mi postlabore elektis, kaj mi ne memoras ajnan vojsanĝon. Postlabora eniĝo, kurante por ne maltrafi ĉi tiun buson. Eble mi estas en iu malvivo, eble iu nekonato efektive mortigis min, kaj eĉ, aĉulo MURDIS min kaj mi ne scias la kialon... Se sciis ne ĉeestus".

Jen alvenas iu pramo por la insulo. "Eble aliri, mi disponas tempon kaj ne emas iri al la laborejo, ne emas al edzkunado; Ne komprenas ajnon pri la ĉi-tiea alveno, ne eĉ scias pri la tago, nenion scias pri la jaro kaj dubas pri la propra nomo. Ĉu frenezeco ekanta? Tien iru, ŝajne ne tropleno da transirontoj... Eble, tie en tiu apenaŭa foreco mi trovos iujn respondojn. Aŭ almenaŭ ĝuos bongustan insulanecon...

Eble, mi trovos ion... Vento vin skuas kaj pluvo draŝas... Ej! Kio tio en la poŝo? La mian vivon perditan, ĉu? Fek! Nur iu poŝkajero plenplena je telefon-numeroj, kodoj ĉiaspecaj, datoj..."

## La PasVorto

Se paroli sincere ŜliSes ne plu komprenis ion ajn el la fatrasa vortumado tajpita aŭ eĉ nure elpensita. ŜliSes verkas pri iu ŜliSes kiu verkas, estas murdita, sed estas iu policsekretariino same murdita, kaj iu forpafita alimonden surstrate, kaj krome jen sur iu insulo. Ne sciis plu ĉu songas, ĉu verkaĉas kvazaŭverkon, kaj eĉ ĉu vivanta. Ne memoris la nomojn de la t.n 'herooj' de la rakonto. Kelkfoje tiel nomata, alimomente alian nomon havas, iam vivanta, iam...

Nun... ioma piediro sen ajna renkontiĝo...Bedaŭrinde malhavis la "kie estas" ilon, kaj la 000000 muskoloj rifuzemas... Eble atingos la vilaĝon kaj ensuĉos iun tian trinkaĵon, demandos la trinkejstron ĉiofaran...

"Kie estas?"...Iu «En la vilaĝo» eliĝis de la trinkejstra buŝo... Ĉu demandi tiun silentan trinkanton? Tiu: "En la vilaĝo. Tagon, Seso»... Tiun alian? Demandito: "En la vilaĝo...Mi, la nova Du'... Saluton al vi, la Seso'..." "Ne Nombro mi".. Tiu: "Parolu vi, nombro ses"... "Mi ne nombro, libera homo jes estas ... Kion volas vi?".. "Informojn ni volas..." ....Ĝi, Seso : «Da ili, siatempe...»...Demandinto Duo grumbla: "Vole malvole vi diros nepre".

Ŝajne jam aŭdis ion similan aliloke alimomente... Tiu alia ŝajne estas iom pli cerbohava...aŭ, almenaŭ dirkapabla. ŜliKvina estas lia nomo. «Ankaŭ mi ne scias... Imagu. Mi ĉeestis je la skribotablo por la mia aperonta romano, kaj jen, mi estas tie ĉi, en tiu ĉi nenomita, eble eĉ sennoma loko. Imagu. De pluraj semajnoj okazas iuj strangaĵoj -sed pri ili ne diris televido. En mia urbo, buso 23, kaj jen... Tio tre similas la vilaĝon Portmeirion<sup>1</sup>, ĉu?»

Tiu: «Plej freneza rakonto. Mi verkis iun senfadenan romanaĉon kaj jen... Vi ĝispuge laca, la liton... Kaj jen, tie ĉi, konvene vestita...Tiu impresio... Iam vidita televidaĵo, strange ĉu?»..

«Ĉu ni kune sindikatu por nepriigi iun trovon, iun respondon? Mi timas ja ion : Ni estas en malvivo... Mi kredas ion : Esti en la postviva akceptejo jen al paradizo, jen malparadizen (ne decas diri inferon)»...

Tiu: «Verŝajne ni dormas kaj songas... Sed eble povas interŝanĝi niajn

---

1 En tiu ĉi vilaĝo fariĝis la televida epizodaro "The prisoner"

adresojn surterajn por plua komprenesploro... Mi emas opinii ke ni ĉeestas en iu transmondo alirebla nur esceptokaze. Ni ĉiuj estas kvazaŭromanistoj kiuj elpensas frenezaĵojn... Kaj estas glutataj de niaj propraj...»

ŜliSes: "Tio signifus ke nia elcerba vomaĵo nin ensorbas??? Freneze. Tio okazas nur en duoneŭraj porbusaj legaĵoj".

Tiu alia: "Memoru. Kiam iu ŜliSes aperis ĉe PIVo-VarHigiena, tiu parolis pri iu sinmemdira romanaĉo, kiun mi ne legis, kiam rakonto rondiras en iu senfino al memrakonto... NI estas enŝlositaj ene, kvazaŭ en ĉambroj mallibereje".

ŜliSes: "Jes. Mi aŭtoras la verkon 'Romanaĉo'... Iome fieras pri ĝi. La herooj same kiel la leganto mem estas frenezuloj. Tiel tio rajtigas min verki aĉan romanon... Sed heroino mi estas en la romano, do tio signifas ke ankaŭ mi frenezas. Mi esperas ke vi ne kredas ke mi tenas vin en miaj ĉeloj..."

ŜilaTria, la sagaca sekretariino : "Do mi resumu. Ni estas mortintoj. Certe ja ĉar oni min dronigis en porbesta bienakvo post mispafo al iu alia persono neniel signifa en la afero. Mi opinias, ĉar mi konas la nomon de la kulpinto ke la plej taŭga maniero eliĝi estas atendi la pramon kaj reveni kontinenton antaŭ la..."

ŜliSes: "Eble sed mi iome opinias ke ekzistas alia vojo... Ni ĉi tie enestas borson kaj kapitalistoj transvendas niajn vivojn... Kaj ni certe ree estus forŝtelitaj..."

TiuLaKvina : "Laŭ mi ni estas en labirinto. Estas unusola solvo, ni trovu ĝin. Je iuj krucpunktoj estas du au pli da elirvojoj kiuj kondukas al aliaj. Se vi sukcesas trovi la malplej longan, jen vi eliĝos rapide..."

Ŝilatria la sagaca : "Kvazaŭ en ludo? Jes ja, sed ni komprenu kiel intermiksiĝas ĉiuj niaj hipotezoj... Kaj ne kontraŭas unu alian... Tie ja la elvojo, kaj poste la murdinton aŭ murdintojn trovos."

Alia Iu.. Laŭvizaĝe tre similas Nulnulsepon: Eble allogi tien la kulpinton... Sed ja nenie ni... Kion do?

El la silento iu kunvenanto lasis, laca : "Mi estas Ivo Senmona de sennomomono... Mi aŭtoris iun romanaĉon en kiu vi ĉiuj rolas, sed mi tiel misbobenis..."

Unuvoĉe, ĉiuj: "DO, VI LA KULPINTO! Vi enpuŝis nin en vian supon aĉan."

IVO laSenmona Sennoma, sopire : ... "Ke mi men enfalis inferon... Iom kvietu, bonvolu. Ni ĉiuj kune trovos elirvojon, la pordon eksteren. Ankaŭ mi estas en la via supaĉo, ankaŭ mi nepre trovu la solvon... Kaj poste vi rajtos juĝi min balaenda for de la via lando, sennoma, senrajta, ene de la viaj landlimoj sed eksterleĝa."

Ŝilatria la sagaca : «... Por la prambuso tro malfruas nun. La lasta en tiuj tagoj je la 8a vespere..."

(...)

Pezas sennuba nokto, kiam vin boras malvarmo sub denorda vento, kiam motoras cerbumado doloriga, kiam silento bruas kontraŭ abruptantaj ventoĵetoj... Kaj plu, plu ĉeestas la tuta ularo, tiuj memeldonantoj esperoplenaj, esperperdintoj enŝlositaj en tiu neejo...

Ekkrie ĉi tiu krizis... " Eĵ! Mi trovis la savan elvojon..."

"Cu?" ĉies eĥis tondre.

"Ni kretenas! Kaj ankaŭ vi, IVO laSenPena! Nur sufiĉas uzi la pasvorton!"

"Kaj kio ĝi estas?"

"Vidu do... Tuj sub la viaj okuloj!!!.. Paĝopiede. Finfino"

Li: Ne funkcias! Aĉ en remaĉ!!!.

Ili, unuvoĉe, Tremank-gajver kaj Tre-nulnulsepo : "Cu vi atentis pri majuskloj kaj

malmajuskloj tajpante? Se tro erar da' vi al la eksplodddd...

FInFiNo





presis la aŭtoro

Tio ne en la aĉe bona lingvo! Vere tiu romanaĉo sukcesis en la celo!

**Gaston-Klod Pipron-Varhigieno**

Mi ĝuadis ensorbi ĉi tiun stultaĵon. La verkinto scipovas forpafi nin en alian mondon por rido tuta.

**Ivo la senpena**

Kretenaĵo. Kuru for. Ne da stilo, ne da signifo.

**Istvan Nelegu**

Ivo Rezeano

[ivorezeano@gmail.com](mailto:ivorezeano@gmail.com)  
[esperantoreze@francemel.fr](mailto:esperantoreze@francemel.fr)

**rajtoj ĉe la aŭtoro.**

**Presis iu: 07.03.2020**

prezo: ?€